4-a Jaro. N-o 181 APERAS SEMAJNE 22. Marto 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner


LA KAŬZOJ DE MILITO

Multo estas skribata pri militoj kaj pri pormilitaj elspezoj, sed malmulto pri la kaŭzoj de milito. Fakte eĉ inter la Laboristaro troviĝas iuj, opiniantaj kaj esperantaj, ke la malarmigaj konferencoj kaj aliaj porpacaj celadoj malebligos la eksplodon de novaj militoj. Inter la neŭtralaj esperantistoj estas ĝenerale disvastigita opinio, ke sufiĉas atingi, ke la homoj parolu unu lingvon, por ĉesigi la intermilitadon. Ili ne vidas, ke la militoj originas de l' ekonomia konkur-batalo inter la entreprenistaro.

La tekniko konstante kaj rapide evoluas. Oni konstruas ĉiam pli kaj pli perfektajn maŝinojn. Ju pli granda kaj perfekta estas la maŝino, des pli malkare ĝi laboras. La grandaj entreprenoj, provizitaj per grandaj kaj perfektaj maŝinoj, tial pli malkare povas fabriki kaj liveri la produktojn ol pomalgrande produktantaj fabriketoj. Kaj, pro la rapideco de l' evoluo, tiuj fabrikoj konsiderataj hodiaŭ kiel grandaj entreprenoj, morgaŭ havos la valoron de pomalgrande produktantoj! Sekve la senĉesa evoluo de l' tekniko kaj industrio devigas la entrepreniston, same senĉese pligrandigi sian entreprenon. Se li ne faras aŭ ne povas ĝin pligrandigi, aliaj entreprenistoj, kiuj pligrandigas siajn fabrikojn, ekkonkuras lin, ĉar ili povas liveri la samajn produktojn pli malkare ol li mem. Tial li nepre estas devigata pligrandigi sian entreprenon.

Por pligrandigi li nepre bezonas monon. Li do devas ekspluati tre forte siajn laboristojn, provante eltiri la kiel eble plej grandan profiton el ili. Alifianke li eĉ devas provi konkure superi siajn konkurantojn. Do, la ekonomiaj cirkonstancoj devigas la entrepreniston, subpremi kaj ekspluati la homojn laborigatajn.

Ni vidas pligrandiĝantajn fabrikojn, kiuj liveras pli kaj pli da produktoj. La



nombroj da konsumantoj ankaŭ kreskas, sed multe pli malrapide ol la kvanto da fabrikataj produktoj. La senplana pliiĝo de l' produktado kaŭzas pli malfacilan disvendon, ĉe mankanta konsumo. Restas fabrikaĵoj nevendeblaj. Sed tio ne signifas, ke la bezonoj de l' konsumanta popolo estas kontentigataj. Nur mankas la aĉetpovo de l' konsumantoj, ĉar la troa produktado kaŭzas ekonomiajn krizojn, kiuj efikas maldungiĝon de multaj laboristoj ne plu enspezantaj monon, sekve ne plu aĉetpovaj. Tiujn efikojn de senplana kapitalista ekonomia sistemo kun ĝia konkura batalo ni observas ĉiutage.

Ne trovante plu aĉetantojn por siaj produktoj, la entreprenisto devas aŭ fermi sian fabrikon kaj maldungi siajn laboristojn, aŭ ruinigi siajn konkurantojn. Estas vere, ke la entreprenisto havas ankoraŭ trian eblecon, nome, li povas unuiĝi kun siaj konkurantoj kaj formi sindikaton (truston aŭ kartelon). Sed tial la stato ne ŝanĝiĝas; unu sindikaton devas konkuri la alian, kaj kiam regas troa produktado, unu trusto provas ruinigi konkure la aliajn.

Ĉar por vendi siajn produktojn, la entreprenisto serĉas novajn vendosferojn (merkatojn) kaj ĉar tiujn li ne trovas en la propra teritorio, kunligita per komunaj interesoj, en la propra ŝtato, — li serĉas ilin ekstere en la mondo kaj tiucele kunligiĝas kun la registaro de l' ŝtato. Tiu ĉi provas helpi al li, trovi la kiel eble plej favorajn ekonomiajn kondiĉojn, aranĝas protektajn doganojn ktp. Ĉar nun la aliaj interesosferoj, la aliaj ŝtatoj, troviĝantaj en similaj kondiĉoj, suferantaj je sama troa produktado, havas la samajn celojn, serĉas novajn merkatojn, — kunpuŝiĝo inter la diversaj ŝtatoj estas neevitebla. Se iu ŝtato rezignas pri la plivastigo de sia interesosfero, fermiĝo de fabrikoj, senokupeco de laboristoj kaj sinsekve ribeloj aŭ eĉ revolucioj rezultos, endanĝerigantaj la tutan kapitalistan sistemon. Sekve li preferas la konkurbatalon kun la aliaj ŝtatoj. Kiam ili ne havas la eblecon, uzi la militrimedojn, la pafilojn kaj venengasojn, ili batalas

per borsaj spekuloj, senhonta reklamo, gazetaro ktp., por ekstermi la konkurantojn. La lasta rimedo tamen restas la milito, kun helpo de malsaĝigita, ŝoviniste alpropagandita Laboristaro.

Do, la kaŭzoj de milito estas intime kunligitaj kun la senplana kapitalista produktada sistemo. Kiom longe ĝi daŭros, tiom longe ankaŭ daŭros la militoj. Kaj nur, kiam la fabrikoj, transportiloj ktp. transiros en la manojn de la komuno, sekve kiam ni estos atingintaj socialistan ekonomian sistemon, ni povos atendi la malaperon de militoj.

Ekzistas hodiaŭ la ebleco, forigi kelkfoje pace konfliktojn pere de kompromisoj, parlamentoj, premo flanke de Laboristaro; sed ĉar fakte la milito ne estas disigebla de la kapitalista ekonomia sistemo, kaj ĉar fakte neniom povas sukcesi sub tiu sistemo la multnombraj malarmigaj konferencoj de tempo al tempo aranĝataj, ni devas ĉiutage antaŭvidi la eblecon de nova milito, kiu estos ankoraŭ multe pli terura ol la lasta.

10 586.



Göteborg,
la urbo de l' 8-a SAT-kongreso

Göteborg estas laŭ la nombro de enloĝantoj la dua urbo de Svedio, sed la plej signifa rilate al komerco kaj industrio. Ĝi havas nun 233 245 loĝantojn (en la jaro 1805 nur 12 490, en 1900 — 130 619). Tiuj ciferoj montras, ke la urbo tre rapide kreskis, pro sia favora lokiĝo, direktita al la maro, kaj kun la ŝancoj havi bonajn markomunikojn kun ĉiuj mondpartoj. La marŝiparo de Göteborg konsistas nun el 293 vapor- kaj motorŝipoj kun 366 194 netotunoj. Sed krom tio venas al Göteborg ĉiujare granda aro da eksterlandaj ŝipoj, kaj la mara trafiko estas tre ampleksa.

Göteborg estas tipa laborista urbo, kelkaj nomas ĝin Leningrado de Svedio. La nombro de industrilaboristoj estas 25 714 kaj dividiĝas en 535 laborejoj kaj fabrikoj. (Dum 1920 estis nur 9792 laboristoj en 257 laborejoj). Laŭ statistiko el ili 8670 estas metalistoj, 6419 tekslaboristoj, 3588 nutraĵlaboristoj, 2068 laboristoj en paper- kaj grafika industrio, 1612 en la lignoindustrio, 878 en ledo- kaj felindustrio, 859 en kemi-teknika industrio kaj 618 en ŝtonindustrio. Dungitaj de la urbo (komunumlaboristoj) estas 2535 laboristoj kaj 2603 oficistoj. La urbaj oficistoj laŭ salajro estas grupigitaj en 23 grupoj. La plej malalte salajrataj havas 1600 sv. kronojn da jarsalajro kaj povas atingi post kelkjara servado salajron ĝis 2400 kr. La oficistoj de grupo 23 havas komencan jaran salajron de 10 000 kr. kaj povas atingi 11 500 kr. Sed por ĉefoj en la urbaj fabrikoj oni pagas ĝis 25 000 kr. po jaro. Do, estas tipa klasa sistemo: Tiu, kiu havas plej pezan laboron, havas la plej malgrandan salajron, kaj ili, kiuj preskaŭ nenion perlaboras, havas la plej altan salajron.

Kune kun la industria evoluo kaj precipe pro raciigado de la industrio dum la lastaj jaroj senlaboreco kaj mizero kreskis. La kvanto da personoj, kiuj devas serĉi komunuman subvencion, kreskas. En 1926 ne pli ol 7,7 elcentoj da loĝantoj — 17 732 personoj — devis ricevi malriĉulan helpon por ne efektive malsatmorti. Inter ili 3761 ne havis hejmon kaj devis resti en urba vartejo de malriĉuloj, la plej multaj maljunuloj. Tion komunikas la oficiala statistiko, sed la mizeron oni laŭ ĝi ne povas taksi. Ĝi estas multe pli granda, ol videbligas la statistiko. Por helpo al malriĉuloj la urbo dum 1926 pagis 2 347 637 kronojn. Laŭ oficiala statistiko dum 1927 estis 3372 senlaboruloj.

La laborista movado de Göteborg estas relative forta. Sindikate organizitaj estas 33 000 laboruloj. Politike la Laboristaro estas organizita en socialdemokrata kaj komunista partioj. Dum la lastaj balotoj al urba konsilantaro la socialdemokratoj ricevis 26 534 kaj la komunistoj 7037 voĉojn. Kompare ni devas citi, ke la komunistoj en la jaro 1922 ricevis nur 2163 voĉojn. La urbkonsilantaro de 1922 ĝis 1926 konsistas el 31 socialdem. reprezentantoj, 26 burĝaj kaj 3 komunistaj. Sed post la balotoj en 1926 ĝi entenas 28 burĝojn, 25 socialdemokratojn kaj 7 komunistojn. La laboristaj deputitoj do reprezentas la plimulton kaj povas en multaj okazoj decidi favore por la Proletaro. Tamen la ŝtataj leĝoj malhelpas ankoraŭ eĉ reformojn komunumajn kaj ankaŭ estas malhelpo, ke la du laboristaj grupoj ne ĉiam povas iri kune.

SAT-anoj!
En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

La kooperativa movado en Göteborg estas tre forta. Nun ĝi havas 8000 membrojn, propran fabrikan bakejon, buĉejon kaj grandan muelejon. Dum 1927 la enspezoj kaj elspezoj balanciĝis je sumo de 755 milionoj de sv. kronoj.

Kiel ĉie en kapitalistaj landoj, ekzistas ankaŭ en Svedio, en Göteborg, — unuflanke granda riĉeco kaj aliflanke granda mizero. Kvankam Svedio havas nur iom pli ol 6 milionojn da loĝantoj, oni per la kapitalista sistemo ne sukcesis krei bonajn cirkonstancojn por



Malnova fortikaĵo, la turo "La leono", Göteborg

ĉiuj loĝantoj. Tamen oni sukcesis ĉion aranĝi tiel, ke la mizero ne estas tuj videbla. Fremdulo facile akceptas la saman opinion, kiun ricevis esp-ista pastro Ĉe dum siaj vojaĝoj: ke Svedio estas tre feliĉa lando. Sed la svedaj laboristoj ne ĝuas feliĉon, konstante minacataj de mizero. Ĉiam ili devas timi la senlaborecon, kiam ili malsaniĝas aŭ maljuniĝas. Certe la cirkonstancoj relative estas iom pli bonaj ol en landoj, kie oni militis, ankaŭ por laboristoj, kiuj havas laboron. Mi trovas la kaŭzon en la vasteco de la lando kompare al ĝia loĝantara malmulteco kaj en la pli ol centjara stato de paco.

Kompreneble la lando dependas de la tutmonda kapitalista evoluo. Oni povas observi, ke Anglio multe influas la svedan politikon per la Ligo de Nacioj. Svedio tute ne malsuperas la pli industriajn ŝtatojn en la batalo kontraŭ la Laboristaro, por la raciigado de la industrio ktp. La grandaj elspezoj por armeo, protestanta eklezio k. a. helpas malriĉigi la popolon, kaj sekve okazigas proletarigon de pli kaj pli grandaj grupoj.

Einar Adamson.

EL ĈILIO

La organizita Laboristaro de Ĉilio troviĝas en bedaŭrinda situacio. La revoluciuloj estas deportitaj al la plej proksimaj insuloj Mas-Afnera, kie ili malbonege estas traktataj kaj devas suferi ĉiajn torturojn. La sindikatejoj estas tute detruitaj. Ĉe la pinto de ĉiuj reakciuloj staras iu kolonelo Ibanez. Pli ol 500 familiaj nutrantoj fariĝis viktimoj de la reakcia reĝimo. Post okmonata malliberecо la arestitoj estis ekzilataj al la altmontaro, kie ili suferas ĉiajn akraĵojn de l' vetero, malsaton kaj malvarmon, kiuj taŭgas por tre baldaŭ fini ilian vivon.

La Laboristaro el ĉiuj landoj devas protesti ĉe la ĉiliaj ambasadorejoj pro tiuj brutaj atakoj kontraŭ la laborista klaso.

Laŭ la esp. gazetservo de "A. I. T." (Berlina Internacio).



Ekleziaj aferoj en Estonio

Kiel oni devigas la homojn, esti membroj de la eklezio

En Estonio laŭleĝe ŝtato kaj eklezio estas disigitaj. Oni neniun rajtas persekuti pro malaparteno al la eklezio. Sen ĝi oni povas edziĝi, doni nomojn, morti ktp. Sed la ekleziuloj devigas kun la apogo de burĝaj partioj la homojn, esti membroj de la eklezio, jene: Se iuj deziras geedziĝi sen la eklezio kaj pro tio iras al la koncerna oficejo, tiam oni postulas de ili bapt-ateston, kaj tiu lasta nur estas ricevebla de pastroj. Sed la pastroj sen prezento de membrokarto eklezia tute ne aranĝos interparolon. Kaj por geedziĝo oni devas havi membrokarton de l' koncerna jaro kaj krom tio pagi por pasintaj tri jaroj la punpagon. En geedziĝa okazo eĉ ne validas pasporto, tiu "grava" personon atestanta dokumento, kiun oni ĉiam devas havi kun si: ĉu ŝanĝante loĝlokon, ĉu migrante. Kiam junulo atingis la 16-an vivjaron, tiam li devas havigi al si pasporton, kaj tiuokaze ankaŭ estas postulata la bapt-atesto.

Membro de la luterana eklezio en Estonio povas esti ĉiu, kiu pagas la membrokarton. Membroj de l' eklezio povas esti ĉiuj: ateistoj, diboĉuloj, drinkeguloj, prostituinoj, ŝtelistoj, mortigistoj, — nur kondiĉe ke ili pagu membrokotizon; nenio krom la mono estas postulata.

La ĉiela regno estas stranga: ĝi akceptas ĉiujn — diboĉulojn, drinkegulojn, prostituinojn, ŝtelistojn, mortigistojn, je la sola kondiĉo, ke ili antaŭ sia morto pentu siajn pekojn kaj diru: "Patro nia, indulgu al mi miajn pekojn, kiujn mi dum mia vivo faris." La ateistoj ne estas ĉielen akceptataj, ĉar sankta skribo diras: "Ĉio estas indulgata, sed pekoj farataj kontraŭ dio, neniam estas indulgataj." La loko de l' ateistoj estas en la infero, kie estas ĝemegado kaj dentogrincado.

Tamen estos restado tie pli bona, ĉar mi spertis dum mia estado en la malliberejo pro la ateismo kaj politiko, kion signifas kunesti kun ŝtelistoj kaj mortigistoj.

(10 438)



Nia laborista klubo

Nia urbeto Rtiŝĉevo — negranda centro de fervojistoj-laboristoj — lokas apud ĉefa fervoja linio Moskvo—Saratov. En la urbo loĝas 15 000 homoj. La laborula fervojista amaso estas unuigita en fervojista sindikato, kiu havas 2000 anojn kun diversaj profesioj. Nia loka fervojista sindikato posedas klubon laŭ nomo de K-do Lenin; en ĝi koncentriĝas la tuta amaslaboro por kulturigo kaj klerigo de l' sindikatanoj. La klubo mem ampleksas ĉ. 900 membrojn. Ĉe la klubo funkcias rondetoj laŭ jena subdivido: 1. profesia, 2. tubmuzika, 3. kantada, 4. pentrarta, 5. fotografa, 6. artista-sceneja, 7. korpkultura, 8. esperanta, 9. kudra.

En ĉiu nomita rondeto ĉiu sindikatano aŭ lia familiano havas la eblon kaj rajton partopreni kiel membro kaj senpage labori kaj lerni. Ĉiu rondeto nur ekzistas, por kulturklerige servi al la kluba laborula amaso. La rondetoj firme ligiĝas inter si mem.

En la rondeto "profesia" oni lernas kaj studas detale pri vivo kaj laboro de sindikata movado dum nuna tempo kaj pasinta, en Sovetio kiel en eksterlando; en "tubmuzika" la anoj (ankaŭ familianoj) lernas muzikarton je tuboj (ĉu flutoj? Red.). La orkestro ĉiam ludas dum revoluciaj festoj ktp.; en "kantada" dezirantoj lernas kantarton kaj same kiel muzikistoj ĉiam senpage kantas revolucikantojn dum festotagoj en la urbo; en "pentrarta" oni preparas la specialajn plakatojn kaj bildojn por ornami salonojn dum la festoj; en "fotografa" la membroj fotografadas bonajn kaj trafajn momentojn el manifestadoj ktp., por ekspozicii en la klubo kaj la murgazetoj; en "sceneja" la amatoroj kelkfoje dum monato aranĝas senpagajn spektaklojn por la tuta sindikata kaj kluba membraro; en "korpkultura" oni okupas sin pri utila kaj saniga sporto. Plejparte anas al ĝi nur junaj gelernantoj de la fervojista lernejo; en "esperanta" oni lernas la lingvon kaj poste interkorespondadas serioze pri diversaj temoj, en la nomo de kelkaj lokaj organizoj kaj de la klubo mem. Tiu laboro estas konsiderata de la kluba estraro kiel serioza socia laboro, kaj la rondeto ricevas financan subtenon, por afranki siajn leterojn al eksterlando kaj por aĉeti lernolibrojn. Fine en la "kudra" rondeto ĉiu edzino, filino, fratino de iu fervojisto senpage povas lerni la kudradon.

Ĉiu ano pagas al la Klubo membrokotizon de 15 kopekoj monate; ano de familio (se li estas ano de l' klubo) pagas nur 10 kopekojn. Ĉe nia klubo ekzistas kinoteatro, kie oni povas rigardi filmojn kontraŭ mono. Tio estas nia loka laborula centro de kultura kaj kleriga laboro, pri kiu mi volonte pli multe skribus, se la K-doj dezirus.

2769.



Laboristoj, ni estas tro multnombraj!

Oni parolas multe pri plibonigado de ĉevalraso, bova raso, porka raso. Sed kial mirinde? Tre malmulte oni parolas pri plibonigado de homa raso. La regantoj de l' mondo ne ŝatas tiun temon. Tio dependas multe de la malpermeso (en multaj landoj) priparoli ĉi tiun aferon. La nunaj regantoj de la burĝaj landoj vidas kun kontenteco la multobliĝon de la Laboristaro, ili permesas al la plej mizeraj pliiĝi, ili trovas en la novnaskitoj la novajn sklavojn de l' industrio, ili rigardas kun kontentiĝo la grandajn amasojn batalantajn pro labormerkato.

Sed ni laboristoj ne rigardu same kontente tiun batalon, en kiu niaj filoj kaj filinoj estas kontraŭ ni pro peceto da pano. Laboristoj, ni estas tro multnombraj! Ne kredante la bibliajn vortojn, ni tamen kredu tiun unu frazon el tiu "sankta libro": la fiagoj de la patroj havas efikojn sur infanojn ĝis la tria kaj kvara generacio.

Ĉu ekzistas pli granda fiago, peko, ol kaŭzado de nova vivo, nova estulo, kiu tie ĉi ne estas sopirata nek bezonata, kaj kies estonto estas treege malluma en tiu ĉi valo de zorgoj kaj malĝojoj? Ni ne plu permesu la ripetiĝon de mizerego, nescio, malsato kaj malsanoj de generacio al generacio. Ili estas filoj kaj filinoj de laboristoj, kiuj plenigas la malliberejojn kaj hospitalojn. Ili estas niaj propraj idoj, kiuj nin kontraŭbatalas pro panero.

Ni ĉesigu la produktadon de l' homa varo, ĉar tro multe jam kuras da idoj sengepatraj sur stratoj de urboj kaj eĉ vilaĝoj. Ili formas la amason de venontaj krimuloj kaj de venonta senlaborula rezerv-armeo de l' industrio. Unuvorte — ni leviĝu super la nivelon de

---

Sendube ekĝojos la legantoj de "S-ulo" eksciante, ke la nombro de ĝiaj abonantoj iom superas 3000.

Tio pruvas, ke estas eble, varbi por nia semajna gazeto.

Tutcerte ni povos havi ĉe la apero de la 200-a n-o 4000 abonantojn, se ĉiu SAT-ano konscias sian devon.

besteco, nia pliiĝo ne plu dependu de hazardo, sed ĝi estu laboro de konscio.

La emo al naskado en Finnlando malfortiĝas

Kiel en ĉiuj aliaj landoj, ankaŭ en Finnlando lastatempe kelkaj burĝaj gazetoj okupis sin pri la supra temo, donante statistikojn kaj ciferojn. Kompreneble ili ĝenerale bedaŭras la malfortiĝon de l' naskemo. "Kio okazos, se la afero same daŭros, rilate al la landdefenda institucio?" "Tiu stato certe kaŭzos altiĝon de la salajroj." En tiaj tonoj kriadas la burĝaj gazetoj.

La rekordon rilate al naskoj oni konstatis en jaro 1906, kiam oni nombris 95 000 novnaskitojn (en lando kun loĝantaro de 3½ milionoj). Lastjare oni nur atingis proksimuman nombron de 65—70 000. "Kia refalo!" "Nia nacio mortas kaj mortigas sin!" krias unu gazeto. "Plej malĝoja estas la stato en la urboj, kie civilizacio kaj vivnivelo estas plej altaj; la defalo de l' familia vivo tie estas plej granda. Estas la socialismo, kiu ĉe la Laboristaro vekis ankaŭ tiun tendencon, same kiel la ceteran senmoraliĝon." Kaj la gazeto daŭrigas, parolante pri bonaj kaj malbonaj antaŭaj jaroj: "Nun jam la samaj principoj venenis la hejmojn en kamparo tra la tuta lando, precipe en Orienta Finnlando — malaltiĝas ĉiujare nombro da naskiĝoj — mono estas pli ŝatata ol infano kaj patrolando. Tio estas la malbeno, de kiu ni devas liberiĝi, aliel la nunvivanta generacio staros ĉe la pilorio[1]) de l' historio kiel mortiganto de l' propra popolo. En Eŭropo oni jam nomas nin la Eskimoj de Eŭropo. La eskimoj formortas pro sia mortigemo kaj krudeco. Ĉu oni permesos, ke tio sama okazu al la popolo de Finnlando?"

Tiel la burĝaj voĉoj. Estus tre danĝere paroli en la lando ion pri naskevitoj aŭ publikigi libron pri tio. Tuj oni metus en punejon la pioniron de l'afero, ĉar laŭ la ĝenerala opinio tio estus krimo kaj krudeco. Sed malgraŭ ĉio la naskiĝoj malmultiĝas, kaj tiun procedon kaŭzas la ordo mem de l' socio, kiu neniel garantias vivon kaj estonton al la malriĉklasano. La socio mem senvualigis la okulojn de la Laboristaro, kiu komencis spirite evolui. Kaj tiu procedo ne estos haltigebla per iaj leĝoj.

V o j a ĝ e m u l o[2]).

1) Malhonora kolono.

2) Tiu temo estas eksterordinare komplika kaj problemeca. Certe, la nuna stato de naskiĝa hazardeco estas kaosa kaj karakteriza por la epoko de burĝe-kapitalista regado. Tamen, post transformado de la homa socio en socialistan ordon, la prinaska reguligo laŭplane plenumiĝos sen bezono de specialaj leĝoj kaj devigoj. Kaj oni eĉ povas dubi, ĉu tiam la frazo: ni estas tro multnombraj, ni limigu la naskadon, havos ankoraŭ ian signifon. La tero racie, socialisme ekspluatata, certe permesos multnombrecon de homaro sen risko de mizero, ĉar la riĉaĵoj de l' tero abundas. N o t o d e l' R e d.

Tago el la vivo de algera "Fatma"

Fatma estas indiĝena virino, kiu por kelkaj cendoj purigas la loĝejojn de la alĝera etburĝaro. Frumatene, la kaŝilo sur la vizaĝo kaj la korpo envolvita per la "haik", ŝi lasas sian nudan ĉambraĉeton, lokitan en la arabaj kvartaloj, por iri al la eŭropa urbo. Ŝi direktiĝas



al la domo, kie ŝi laboros dum la tuta tago. Komence ŝi purigas la ŝtuparon, poste ŝi daŭrigas de loĝejo al loĝejo purigi ĉiujn apartamentojn. Ŝi laboras tie ĉi unu horon, tie du aŭ tri horojn, laŭ la riĉeco de la loĝanto. Kiam estas tagmezo, bonkora mastrino donas al ŝi pecon da pano kaj tason da kafo, ĉar la mahometana Fatma timas la kristanan manĝaĵon. Fine ĉirkaŭ la 16-a aŭ la 17-a horo, ŝi returnas sin hejmen. Antaŭ ol eniri, ŝi aĉetas rabate legomojn kaj fruktojn malfreŝajn por vespermanĝi kun sia edzo kaj eble siaj infanoj. Poste ŝi kuŝiĝas sur teron aŭ sur matracaĉon ĝis morgaŭa tago je la 4-a. 5064.



Faktoj sen komentoj

Pnom-Penh. — La ceremonioj, kiuj antaŭis la cindrigon de l' kadavro de la reĝo Sisowat, komenciĝis la 2-an de marto. Luksan funebran paradon konsistigis kelkcent standard-portantoj, dudeko da elefantoj riĉe ornamitaj, la reĝa muziko kaj multnombraj indiĝenaj orkestroj, francaj trupoj kaj indiĝenoj de la garnizono. Korteganoj, ministroj kaj familiaj membroj, ĉiuj blanke vestitaj, antaŭiris la alegorian ĉaron, kiu portis en la supro oran urnon. La sekvantaro, marŝanta en longeco de kelkaj kilometroj, ĉeestis solenan suprenlevon de l'urno sur piedestalon, kie ĝi restis ekspozita ĝis la 9-a de marto, tago de l' cindrigo.

* * *

Parizo. — La 3-an de marto alvenis de Cannes (elp. Kan, urbo en suda parto de Francio, kie riĉuloj vintrumas) la kadavro de K-do Eŭgeno Landler, hungara revolucia ĉefo. Ĝi estis transportata sub ruĝaj standardoj tra la laboristaj kvartaloj de Parizo al tombejo Père-Lachaise (elp. Per Laŝez). La tuta stratlarĝeco estis tenata de la densaj vicoj de l' laborista amaso. La ĉerkoveturilo malaperis sub la ruĝaj florkronoj, kaj la skarlataj standardoj ĝin ĉirkaŭantaj, flirtantaj, formis solenan baldakenon super la revoluciula kadavro. En la tombejo okazis alparoloj de francaj kaj hungaraj K-doj dum ĉeesto de amasego pleniganta ĉiujn trairejojn. La urno kun lia cindro estas transportota Sovetion.

ĜUSTIGO

En n-o 178 de "S-ulo" ni publikigis biografieton de sovetia K-do pri Blasko Ibanez. La enhavo de tiu artikolo iom tiklis al ni, kaj en la manuskripto ni eĉ forstrekis la epiteton "sennaciulo", kiun uzis entuziasme la aŭtoro. Sed, tial ke ni legis neniun verkon de tiu hispana verkisto, ni fidis al la informiteco de K-do Krassovskij kaj enmetis lian artikolon. Nu, post ties apero, kelkaj legantoj protestis kaj pruvis, ke Ibanez estis — ŝovinisto! Tio klare montriĝas en liaj verkoj: "La kvar kavaliroj de l' Apokalipso" kaj "Nia Maro".

El tiu mispaŝo ni konkludu, ke la sovetia publiko ne estas ĝuste informita pri la hispana literaturo — kaj eble pri aliaj; ke la SAT-gazetoj, precipe "S. R.", povus ludi tre gravan rolon — se en ĉiuj lingvo-regionoj estus kompetentaj kaj laboremaj K-doj, kiuj tute ĝuste informus la legantojn.

Al tio ni devas celadi.

Efikoj de la pendigilo

Ni raportis siatempe en "S-ulo" detale pri la ekzekuto pendigila de la laŭdiraj atencintoj al la katedralo de Sofio en jaro 1925, K-doj M a r k o F r i d m a n kaj K o e f. Ĉiu memoras pri la kruelaj akcesoraj cirkonstancoj de tiu bruteca fimortigo, kiu okazis en publika loko kaj kiun ĉeesti oni kvazaŭ devigis la tutan loĝantaron. Tiu abomena spektaklo faris precipe plej profundan impreson al la infanoj, kiuj de tiu tempo prefere ludas "pendigi", pri kio jam kelkfoje devis okupi sin la bulgara gazetaro. Ankaŭ Barbusse skribis pri okazo, kiam infano (kiu ludis M. Fridman) estis fakte pendigata de la Kamaradoj.

Kaj la 23-an de januaro 1928, do preskaŭ post 3 jaroj, ree tia okazo faktiĝis. La malfeliĉa infano estas la dektrijara lernanto K o s t a R a i n o v, la sola infano de siaj gepatroj kaj konata kiel bonmora kaj treege inteligenta.

Kelkajn tagojn antaŭe la patro montris al gastoj bildojn pri la pendigo de M. Fridman kaj parolis kun ili pri tio. Post nemultaj tagoj oni trovis Kosta-n, kiu estis aŭskultinta la interparolon, kiel kadavron, pendigitan ĉe la fenestro. La etulo estis ludinta "pendigi". Por ke li ne dolorigu sin per la ŝnuro, li antaŭe ĉirkaŭ la kolon ligis al si poŝtukon.

La registara gazetaro kompreneble konsideras sensignifa tiun okazon, kaj la registara gazeto "Utro" skribas, ke la gepatroj do ne lasu solaj hejme siajn infanojn. Sed estas tute kompreneble, ke la infanoj nur en tia lando ludas "pendigi" kaj okaze dum tio akcidentas, kie la pendigado estas la regulo kaj publikaj ekzekutoj apartenas al la plej karakterizaj institucioj de tiu lando.

Eksterordinara tago el mia vivo

Brrr! Brrr! Brrr! kriegas la alarmhorloĝo (farita en Italio) je la 5-a en dimanĉa mateno. Laŭ la di-anoj dimanĉo estas la sankta tago de ripozo, sed por mi — SAT-ano 488 — precipe dum vintro ĝi estas la plej okupoplena tago. Vestinte min mi iras al la kuirejo, bruligas la gason per alumeto (farita en kooperativa fabriko en Finnlando), por boligi la akvon. La matenmanĝo konsistas el teo (hinda aŭ ĉina), ovo, buter-pano (farita el greno kanada aŭ argentina kaj marmelado (farita el hispanaj oranĝoj). Kun vetursako en manoj mi biciklas al la aŭtomobilejo. Usona oleo, sovetia (tielnomata R. O. P., rus-ole-produktoj) petrolo[1]) pretigas la aŭtomobilon, kiu devenas el franca fabriko.

Je la sesa mi devas preterpasi la turon de la Parlamentejo, ĉe kies supro, per senfadena telefono, la horloĝego "Granda Benĉjo" indikas ofte la tempon al malproksima Usono kaj Aŭstralio. Orienten laŭ la rivero Tamizo mi veturas tra la kvartalo de la financestroj (la modernaj nekronitaj reĝoj) kaj bankpalacoj, tra la kosmopolita kvartalo A l d g a t e (t. e. malnova pordego de la urbo), kie loĝas multaj alinacianoj, kies nomoj sur butikoj rakontas pri germana, pola, itala, hebrea devenoj. Londono neniam dormas, kaj dum pli ol 15 kilometroj la stratlanternoj kaj tramreloj gvidas mian iradon. La laktvendistoj kaj ĵurnalportistoj bruas tra la stratoj, kaj la policanoj ĉe la stratanguloj atendas la finon de sia nokta deĵoro.

Tagiĝis, kaj mi povas estingi miajn elektrajn aŭtolampojn kaj veturi pli rapide. Fine postlasinte la urbon, mi turniĝas norden, ĉar en la antikva urbo N o r w i c h (elp. Norŭiĉ), malproksima je 180 km., seriozaj studantoj de "Petro" atendas min je la 10-a. Se la aŭtomobilo bone funkcias, mi veturas 32—65 km. dum horo. Sed vento, nebulo, pluvo kaj frosto, kiu glatigas la gudritan vojon, kelkfoje malhelpas. (La gudro venas el Norvegio). Eble najlo trapikas la kaŭĉukan radrondon (farita de mondfama firmo en itala fabriko), kaj mi devas anstataŭi per la kromrado aŭ ripari. Kelkfoje iu parto de la aŭto difektiĝas, kaj mi malbenas



la sorton de laborista klaso, kiu faras la plej bonajn aŭtojn kaj uzas aŭ nenian aŭ nur la plej malkaran. Okazas halto, prokrasto, aŭ mi devas veki ripariston el varma lito, kiu ankaŭ malbenas kaj pagigas min multe por sia helpo.

Laŭ ĝenerala opinio Britio enhavas tro multe da loĝantoj. Sed survoje ofte mi ne povas vidi eĉ dometon. En la bienoj de la terposedantoj la kuniklo ludas, kaj mia alproksimiĝo nur timigas la fazanon kaj la perdrikon (pafotajn kiel sporto por riĉuloj). Ĉe N e w m a r k e t (elp. Njŭmarket) la vastaj erikejoj estas uzataj nur kiel ĉevalkurejo, kaj mi preterpasas svarmojn da belaj ĉevaloj — pli bone prizorgataj kaj vestitaj ol laboristaj infanoj — kiujn ekzercas ĉiutage la ĵokeoj. Poste laboristoj malsaĝe malŝparas monon per vetado pri la konkurso de tiuj ĉi bestoj; eĉ nia sola ĉiutaga laborista ĵurnalo, "D a i l y H e r a l d" (Ĉiutaga Heroldo) estas devigita, doni raportojn kaj konsilojn pri tia afero. Ĉiutage ĝi aperigas notojn pri vetado; nur vendrede notojn pri esperanto.

Malgaje meditante mi rapidas al alia urbo, T h e t f o r d. Antaŭ multaj jarmiloj tie la prahomo ĉizis la unuajn silikajn ilojn per la korno de l' cervo. Tie ĉi la Roma Imperio konstruis fortikaĵon. Sed io pli grava — en tiu ĉi urbo naskiĝis T o m P a i n e (Pejn), kiu atakis en la 18-a jarcento superstiĉon, helpis supernacie la revoluciojn en Usono kaj Francio kaj deklaris: "La tutmondo estas mia patrio, kaj 'fari bonon' mia religio." Pioniro de SAT, ĉu ne? Modesta monumento ĉe la vojkruciĝo atestas lian vivon.

Kiam mi alproksimiĝas al Norwich, mi salutas tre proksime urbeton W y m o n d h a m (elp. Ŭindham) kun malnova kverko, sur kiu la registaro en jaro 1549 pendigis K e t, la gvidanton de la lasta armita kamparan-ribelo kontraŭ la perforta ekposedo kaj riĉula forŝtelo de la komunaj kampoj kaj kontraŭ la detruo de la lastaj restaĵoj de la praa komunumo. —

Mia kurso en Norwich, en la halo de botfabrikista sindikato, estis organizata de la NCLC (edukada fako por laborist-sindikatoj). Komence mi havis 25 gelernantojn, sed nun nur dek regule ĉeestas, kiuj jam komencis korespondadi post trimonata studo de "Petro". Post elparolo de "ĥ" (malfacila, sed gorĝon malferma por angloj), ni malfermas la kurson per "La Internacio". Ĝi daŭras ĝis la 12-a. Poste, ĝis la unua mi devas instrui ekonomion. Nia esp. kurso helpas akiri informojn pri alilandaj salajroj ktp. por la ekonomiaj studantoj. —

Manĝante kelkajn sandviĉojn (bulkojn), mi ekveturas al I p s w i c h (elp. Ipsŭiĉ), malproksima 67 km., por je la 3-a en kurso por junuloj klarigi la evoluon de socio, estiĝon de laborista klaso, kreskon de laboristaj organizoj kaj aliajn temojn el socia historio. Same mi instruas en F e l i x s t o w e (elp. Filiksto) je la 8-a vespere en kurso por plenaĝuloj. Tiu urbo distancas 16 km. de Ipswich, kaj tie mi restas ĝis lundo matene, enspirante ĉe la marbordo freŝan aeron kaj sunbrilon (se ĝi favoras nin).

En tiu ĉi urbo lastjare Webster preparis sian aviadan rapidflugon, kiu havigis al li internacian trofeon. Fakte li estas soldato, kaj dum ni banas en la lumo kaj aero, liaj kolegoj krakadas, ŝvebante super la urbo kaj preparante bombĵetadon en la venonta milito.

Posttagmeze revenante hejmen mi devas gvidi kursojn en B r a i n t r e e (elp. Brajntri), la hejmo de la firmo C r i t t a l l (elp. Krital), kies kadroj por fenestroj kaj pordoj vendiĝas ĉiulande. Je la 7-a horo oni uzas "Petro"-n, je la 9-a studas ekonomion. Post plia veturado de 80 km. mi je noktomezo reatingas la "Grandan Benĉjon". Dum la semajno okazas aliaj vesperaj kursoj, kiuj necesigas veturadon. Certe mi rifuzus laboregi tiel por ordinara mastro, kaj dum somero la kursoj iom malpliiĝas.

M. S t a r r.

---

[1]) Eble interesas sovetiajn K-dojn la kostoj: En Londono oni pagas 8½ pencojn (proks. ⅓ rublon) por 1 "galono" (= 4,543 litroj). Antaŭ la konkuro de R. O. P. la trustoj "Shell kaj Standard" postulis po 19½ pc. por 1 gal. de unuagrada petrolo, sed ili poste devis vendi por 13½ pc. Ĉu mirinde, ke ili denuncas la vendadon de "ŝtelita" petrolo?

TRA ESPERANTIO

ĈU SAT-ANO DEVAS ALIĜI AL PARTIO KAJ SINDIKATO?

SAT estas superpartia organizo. Ĝia karaktero estas proleta, kaj ĉiuj SAT-anoj konfesas kvazaŭ jam per sia SAT-membriĝo, ke ili konsideras sin proletoj. Sed neniu el ni povas postuli, ke SAT ludu la rolon de partioj aŭ sindikatoj. La unuaj laboras en parlamentoj ktp. por sociaj plibonigoj ĝeneralaj, dum la duaj prizorgas la profesiajn aferojn de la Laboristaro. Ambaŭ organizoj havas gravan ekzistorajton. Tion komprenas granda parto el la proletoj; tial ili parti- kaj sindikaniĝas. Nu, ĉu sindikatoj kaj partioj povus ekzisti, se la proletoj, por kiuj ili estas kreitaj, rezignus ilin subteni per aliĝo? Certe ne.

Vere, ambaŭ organizformoj ne estas perfektaj ĉiurilate, kaj ili ne povas respondi al ĉies deziroj. Sed maleblas fondi por ĉiu al ni apartajn sindikaton kaj partion. Ĉiu organizo povas nur esti kadro por la membroj, en kies interno interpuŝiĝas ofte la diversaj opinioj. Konsiderinda restas la fakto, ke ĉiun per la organizoj atingitan profiton ĝuas ne nur la membroj de l' organizo, sed ankaŭ multaj aliaj samspecaj laboristoj. Kaj ĉu ne estas hontinde profiti, kie oni ne oferis?

Preskaŭ en ĉiuj landoj bedaŭrinde troviĝas nune k e l k a j proletaj partioj. Ĉu tio povas esti malhelpaĵo aliĝi al iu? Tute ne! Plenkreskulo d e v a s posedi tiom da kuraĝo kaj juĝkapablo elekti tiun organizon, kies taktiko aŭ celo pli malpli koincidas kun liaj. Se li ektrovus, ke li eraris, tiam li ŝanĝu la organizon. Ofte estas aŭdeble, ke iu ne volas aliĝi pro personaj motivoj. Ĉu indas por serioza homo, ne subteni grandan ideon pro tiaj bagateloj?

Morala devo estas por ĉiu ekspluatato, aliĝi al tiuj ĉi organizoj. Voĉdoni nur por ili dum ĝeneralaj balotoj, tute ne sufiĉas, ĉar nur la membrokotizoj ebligas ĉiun ajn laboron kaj estas kvazaŭ la spino de ĉiu organizo. Ni, SAT-anoj, kiuj ĝis ioma grado estas rajtigitaj konsideri nin kiel avangardo de la Proletaro, devas nepre kompreni la gravecon de la organizdemando kaj konsekvence agi.

Certe, SAT ne povas postuli de ĉiu novaliĝinto, ke li tuj fariĝu membro de sindikato kaj partio. Tamen ĉe nia venonta kongreso tiu temo povus esti pridiskutata. Sed jam hodiaŭ SAT postulu, ke ĉiuj ĝiaj dungitaj oficistoj estu organizitaj sindikate kaj partie. Kaj ĉiuj niaj funkciuloj, precipe la komisionanoj, donu por la membraro bonan ekzemplon en ĉi tiu demando.

Per tiu artikolo mi celis atentigi ĉiun leganton pri la graveco de sindikato kaj partio, ke li sentu sin instigata aliĝi al ambaŭ, se li ne faris tion ĝis nun. Tiam ni povos ankaŭ pli sukcese labori por nia esperanta ideo inter la membraro de tiuj organizoj.

L e i p z i g a n o (135).

P. S. Por Sovetio miaj asertoj valoras nur ĝis ia grado.



La oferemo de SAT-anoj

K-do E. Izgur sendis al ni pri la ĉi supra temo longan pledon, kiun pro manko de loko ni ne povas publikigi. Tial ke nia SAT-ano verkisto estis malprave suspektita, rilate ricevon de honorario flanke de SAT pro aŭtorrajtoj, ni devas almenaŭ konigi la veron tiurilate:

La aŭtoro de "Nur volu" *kaj* "Je la nomo de l' Vivo" *tuj ĉe la unua eldono rezignis siajn aŭtorrajtojn; neniom da honorario li ricevis.*

Plie li sciigas per ĉi tio, ke, se proletaj organizoj, ne havantaj eblon pagi honorarion, konscias kiel devon disvastigi liajn verkojn "Nur volu" *kaj* "Je la nomo de l' Vivo" *en nacia lingvo, ili tion povas fari tute libere. La plej granda rekompenco por li estos konscii, ke lia vivo ne trapasis vane.*

K-do Izgur ankaŭ sciigas, ke lia verko "Je la nomo de l' Vivo" *estas jam tradukita germanen, francen kaj sveden.*



PLENDO PRI KORESPONDADO

Ĉiam oni povas legi en fako "Korespondado" — "respondo garantiata" k. s. Sed fakte devus signifi: "respondo malgarantiata" kaj "ne certe respondas". Tre longe ni batalis, ĝis ni organizis oficialan oficejon ĉe distrikta sindikataro por intern. korespondado. Ni motivis per tio, ke korespondado estas dezirinda por lab. sindikatoj, kaj pere de esp. ni tre rapide ĝin organizos kaj ricevos baldaŭan respondon. Sed, ho ve! mi jam forgesis, kiom da leteroj mi forsendis kaj ricevis dume entute — u n u respondon, malgraŭ ke mi enmetis pretajn kovertojn kun resp. adresoj. Ĉu tiel oni povas atingi sukcesojn? K-doj, pripensu tion!

M. R e j t m a n.

Red. noto. — Similajn plendojn ni ricevas abunde. Sed ne dependas de ni, ĉu la koresp.-anoncintoj estas seriozaj aŭ ne. En nia epoko ŝajnas, ke promesoj, devoj, unuvorte m o r a l o estas io antaŭjuĝa. Grava problemo nefacile solvebla. Cetere oni ne forgesu, ke ne ĉiuj anoncintoj estas SAT-anoj, k. ke eĉ inter la SAT-anoj troviĝas bedaŭrinde neseriozuloj. Tiaj uloj konsistigas la balaston, kiu ĝenas nian antaŭeniradon.

PRI INTERŜANĜO DE SALUT-LETEROJ POR 1. MAJO

Ankaŭ en tiu ĉi jaro certe estos la deziro de vastaj proletaj amasoj, interŝanĝi vigle unuamajajn salutleterojn, por interalproksimiĝi. Do, estas la inda devo de ĉiuj SAT-anoj, plej akurate kaj laŭcele solvi la starigitan taskon, per tio propagandante por esp. kaj SAT. Necese ankaŭ estas, tiuokaze rememorigi, ke oni ĝustatempe sendu, ne nur kalkulante la tempon, kiun bezonas letero de unu lando al alia, sed ankaŭ la tempon, bezonatan por traduki kaj aperigi ĝin en la unuamajaj n-oj de l' gazetaro. Krom tio estas dezirinde, ke forsendante la esp. leterojn de neesp-istaj organizoj, oni aldonu la originalojn kun stampo, subskriboj ktp., ĉar la efiko tiam estas pli granda. Speciale efikaj estas leterinterŝanĝoj inter samfakaj, samprofesiaj organizoj kaj ĉeloj diverslandaj. Ni do rekomendas la anoncojn en tiu ĉi kaj venontaj n-oj de "S-ulo", kiuj koncernas leterinterŝanĝon por 1. majo, al la speciala atento de niaj laboremaj kaj propagandemaj K-doj.

PRI SAT-KONFERENCO

Kiel jam sciigite, post fino de la 8-a SAT-kongreso okazos la t. n. SAT-Konferenco, al kiu jam parto da sindikatoj (internaciaj kaj naciaj centroj) kaj div. aliaj organizoj estas invitita per la sube presita letero, kiun la aktivaj SAT-anoj volu traduki nacilingven kaj sendi al sia sindikata resp. partia ĵurnalo. La perantoj, kiuj ricevos peton de la invititaj organizoj, do komprenos, kion ili devas fari.

I n v i t l e t e r o. Kara K-do, kun granda plezuro mi volas en la nomo de SAT[1]) kore inviti vian organizon partopreni en tre grava konferenco. Ĝi okazos en Göteborg (Svedio) la 18-an kaj 19-an de aŭgusto 1928. La provizora tagordo estas jena:

1. Alilanda korespondado individua kaj grupa;
2. Reciproka interŝanĝo de metilernantoj;
3. Alilanda libertempa vizitado de infanoj kaj maturaĝuloj per laborista vojaĝ-asocio;
4. Somerlernejoj kaj tendaroj en laborista edukado;
5. Rilatoj de fotoamatoroj, sportuloj, junuloj ktp.

Ni bonvenigos pluajn proponojn kaj ankaŭ la nomojn de K-doj, kompetentaj por raporti en tiuj ĉi faktoj, kaj rilatajn

---

[1]) Aldonu klarigon pri signifo kaj celo de SAT.

dokumentojn. Sendu kiel eble plej baldaŭ por enmeto en la presota tagordo.

Via organizo rajtas sendi laŭplaĉe kiom ajn da delegitoj, sed la kotizo por ĉiu delegito estas 1 marko. Ni penos trovi malkarajn loĝejojn ktp. en Göteborg, por limigi la kostojn. Por ŝpari tempon kaj gajni efikon en la Konferenco, ni proponas, ke ĉiu delegito povu paroli en sia preferata lingvo, sed nur esp-o estu uzata kiel tradukiingvo, kaj en ĝi aperos la raporto.

Ne necesas substreki la bezonon de interkompreno en la tutmonda Laboristaro. Sur laborista solidareco fondiĝas ĉiu espero de pli bona mondo. Tiu ĉi Konferenco estas helpilo al tiu celo, kaj se vin interesas, mi volonte sendos pliajn detalojn.

En la nomo de SAT-Ekzekutivo.

Frate la via,

Mark Starr.

P. S. Se vi volas havi tradukon de tiu ĉi letero, helpos vin K-do (nomo kaj adreso de la SAT-peranto).

PRI VOLONTULA TRADUKA SERVO

Kelkfoje K-doj diskutis supran demandon en "S-ulo", lastfoje en n-o 176. Al tiu lasta artikolo mi ne povas tute konsenti; ĝustas, ke la gvidantoj ne emas lerni pluan lingvon, sed estas ja fakto, ke la Proletoj plejcerte kredas al utilo de iu afero, se ĝin rekomendas la gvidantoj. Krome: ĉu nia celo ne estas, utiligi esp-on al la tutmonda laborist-movado ĝenerala? "La venko de esp-o venas (NUR?) de malsupre." Bone, sed ni konsideru la antaŭe cititan fakton, ne forgesu nian celon kaj naturan spiritostaton de la Proletoj. Nome, ni tre bone spertis, ke gvidantoj konvinkitaj pri valoro kaj utilo de esp-o, nepre estas niaj plej bonaj propagandistoj. Ĉu pruvoj necesas? Mi nur intencis iom korekti tiun flankiĝintan opinion, ĉar neklareco tiudirekta povus fariĝi tre danĝera por nia movado.

Ĉu vi scias, ke la ĉefgvidantoj de la idistoj kolektiĝis en Moskvo kaj tie jam sukcesis fiksi ido-paroladojn pri (nature unue) neidaj temoj pere de plej forta "Radio-sendstacio je nomo de Komintern"? Certe ili nur sukcesis, ĉar unue ili interrilatis kun GVIDANTOJ, ĉu ne? Do, ankaŭ ni ne povas NUR de malsupre esperi disvastigi nian lingvon, sed ankaŭ ni bezonas helpon de la gvidantoj ĝis certa grado. La Socialista Sport-Internacio Laborista aplikas esp-on kaj tre propagandas por esp-o, sed ankaŭ tio okazas pere de la gvidantoj, kiuj nun eĉ mem studas esp-on; jen plua pruvo, ke la opinio de K-do Vahtkerl estas tro ekstreme flankiĝinta de fakta stato. 715.

Konferenco de SAT-anoj el la 5-a sektoro

En iu antaŭa n-o de "S-ulo" ni jam komunikis, ke dum la Paskotagoj (7., 8. kaj 9. apr.) en Amsterdam okazos Konferenco de SAT-anoj el la kvina sektoro. La programo tekstas jene:

Sabaton je la 20-a horo: salutvespero. (Ejo: Diamantklubo "Konkordo", Weesperplein 1). — Dimanĉon je la 10-a horo: Laborkunsido. (Ejo: PAS-Konstruaĵo, Plantage Parklaan 9). Posttagmeze: traurba promenado. Vespere je la 20-a h.: sciencaj paroladoj. Lundon: dumtage eksterurba ekskurso (i. a. al maro), vespere je la 20-a adiaŭa vespero.

Pro la altaj kostoj ni estas devigataj postuli de la konferencanoj kotizon de f. 0.50. K-doj, kiuj intencas partopreni, estas petataj komuniki tion, la daton kaj horon de alveno en Amsterdam al K-do G. H. Bosma, Wingerdweg 1, Amsterdam-Noord, al kiu ankaŭ la kotizo estu pagata. Por K-doj, kiuj deziras tion, ni rezervos ĉambrojn por la plej malaltaj prezoj. Gek-doj samsektoranoj ni kore invitas vin veni al Amsterdam por pasigi utile kaj agrable la Paskofeston. 5941.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Francio. La 8-a kongreso de "Fédération Esperantiste Ouvrière" okazos en Bourges dum pasko. Krom la div. laŭstatutaj raportoj la Kongr. diskutos pri 1. rilatoj inter LEA-oj k. SAT (projekto de EK de SAT); 2. instruo de la lingvo; organizado de perletera perfektiga kurso. El la morala rap. notinda estas la agado de la Estraro de FEO por laŭebla efektivigo de rezolucioj voĉdonitaj de la kongr. de Amsterd. Internacio k. de franciaj rev. sindikatoj (CGTU). Estis presataj 7000 cirkuleroj, kun aliĝilo por subtenantaj membroj, kies duono jam estas dissendita al la sindikatoj. Sekve alvenis kelkaj aliĝoj al la centro aŭ al la grupoj, k. informpetoj. Nia koresp. kurso ricevis, dum 1927, 295 informpetojn, enskribiĝis 190 gelern. Dum la jaro ni vendis 909 ekz. de nia kurslibro (de dec. 1925 — 3954 ekz. de la dua eldono estis venditaj). Parolaj kursoj funkcias nun en Bourges (30 lern.), Cette, ĉe kom. pioniroj. Grenoble (14 lern.), La Rochelle, Lyon, Marseille (en laborborso kaj Intern. Klubo de maristoj), plie 2 grupoj ekzistas en la antaŭurboj L'Estaque k. Saint-Henry, Montlucon, Nancy (du kursoj), Nimes (la laborborso pagas la kursgvidanton k. liveras senpage al la lern. lernolibrojn kaj kajerojn, el 30 enskrib. restas 16 lern.), Orleans (du kursoj ĉe popoldomo k. unu en laborborso), Paris (el 150 enskrib. ĉe 6 kursoj restas ĉ. la duono, jam 24 novaliĝojn ricevis la grupo, en Pariza regiono: Aulnay-sous-Bois, Boulogne, Courbevoie (15 lern.), Gargan-Livry 2 kursoj, 15 k. 17 lern.), Le Raincy (17 lern.), Pantin (10 lern.), Port-Sainte-Marie (Lot-et-Garonne), Romans, Saint-Etienne, Saint-Pierre des-Corps (20 l.), Troyes, Tours, Toulon (2 kursoj), Vierson. Grupoj stariĝis en Montivilliers, Toulouse, Digoin (Saône et Loire). Novaj kursoj malfermiĝos en Agen k. Nérac (Lot-et-Garonne). — **Belga Sekcio.** En Bruxelles 4 kursoj por komenc. k. unu perfektiga (sume 68 lern.) Sekve de kurso ĉe tramista sindikato fondiĝis sekcio 30-membra. 18 lernas per koresp. kurso. En Borinage, regiona grupo stariĝis; Verviers, agema grupo; Liège, grupo stariĝanta. — **Svisa sekcio.** Kursoj en Ĝenevo (25 lern.), Lausanne (20 lern.), en Social-Junularo de Vevey (16 lern.), en Le Locle (15 lernantoj). La sekretario H. Cachon. — **Sovetio.** Vjatka. Regule funkcias 2 kursoj k. 3 rondetoj en lernejoj k. klubo. Progresoj ankaŭ en regionaj urboj de gub., Jaransk k. Omutninsk. Gub. Kom. de IRH eldonis 18 div. pk. ilustr. kun esp. teksto. 13. 2. vesperkoncerto k. raporto de K-do Flejs pri ekonomio k. polit. vivo de eksterl. Laboristaro laŭ ricevitaj leteroj. Ĉe klubo ekspozicio de esp-aĵoj. Gub. Kongreso de profsindikatoj ricevis 5 eksterl. salutleterojn per esp. "Vjatka Vero" ĉiudimanĉe presigas 2—3 artikolojn laŭ esp. leteroj, esp. servo k. "S-ulo". 229.

Ĉe la neŭtraluloj

Instrua ministerio en Grekio publikigis jenan dekreton:

Ateno, la 14-an de okt. 1927.

Helena Respubliko
Ministerio de kultoj
k. de publika instruo
Nro. 36 816

Al la

Direktoroj de la Instruistaj Seminarioj de Elementa kaj Mezgrada Instruado.

Konsiderante la gravecon, kiun en la civilizita mondo prenas ĉiutage la intern. lingvo esperanto, k. opiniante ke la instruistoj de Elementa k. Mezgrada Instruado akiros grandan utilon el ĝia ellerno, ni komisiis d-ron A. Stamatiadis por instrui espon al la gelernantoj de la Instruistaj Seminarioj, kiuj troviĝas sub nia direkto.

La Ministro: subskr. T. Nikoloudis.

La 4. Ĉeĥoslovaka Esp-o-Kongreso okazos pentekoston en la bela banurbo Teplitz-Schönau (Norda Bohemio). Post la kongr. okazos ekskurso al la min-montaro.

SENNACIECA REVUO

Januaro/Februaro 1928

LITERATURO

Enhavo: Henriko Allari: Skarlata maljusto. Novelo. — S. Grenkamp: Radio. Vers. — L. Ivn: La insigno. — Ŝio Traŭbe: En "kontoro". Humoraĵo. — Multatuli: Pri moroj. El la holanda trad. G. P. Bruin. — G. Karaslavov: Al la vivo. El la bulg. trad. Stebek. — En la torturejo de la faŝistoj. El la germ. trad. Erich Haseloff. — N. Berendhof: Kampo da brakoj. Vers. El la rusa trad. N. N. — Mi-kaj-ŝi: La politikaj rifuĝantoj. — Vl. Elagin: Agitisto Ĥismetov. El la rusa trad. Vs. I. — N. M. Ĉernavskij: "Apogo de malfortuloj". El ruslingva manuskripto trad. N. Nekrasov.

Entute 32 paĝoj.

Havebla ĉe la Administracio:
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Samoucitel mjeĵdumaroduavo jazyka pod redakcjej E. D r e z e n. Ŝtata Eldonejo, Moskvo 1927, 102 pĝ.

Ni bedaŭras, ke la aŭtoro, en la cetere bona lernolibro, donas kelkajn neoficialajn sufiksojn, kio — laŭ nia opinio — misgvidas la lernantojn. Fine, kial "nur" e n d, i o, o z, i s m kaj ne ankaŭ i z, i v ktp. Aŭ — aŭ. Ŝajnas al ni nepre evitinde fari tion laŭ sia propra gusto. Se ĉiu tiel faros, ni post 20 jaroj ne plu interkompreniĝos. Ni havas pruvojn, ke sovetaj K-doj jam plendas kontraŭ tiu enkondukema manio! Ni ne malfaciligu nian lingvon. S. G. K.

Landoj de l' Fantazio, de T e o J u n g. Romano en tri partoj, originale verkita en esperanto. Kun kvar tutpaĝaj ilustraĵoj, titola kaj kovrila bildoj. 328 paĝoj. Prezo broŝ. g. mk. 3.20 (svis. fk. 4.—), duontole bindite g. mk. 4.80 (sv. fk. 6.—).

La libro laŭ la literatura k. ideologia vidpunkto ne prezentas grandan valoron. Sed ni tamen povas ĝin rekomendi pro la grandparte bona k. flua lingvo. Multaj laste aperintaj verkoj de eminentaj esp-istoj montris, ke ili ne scias aŭ jam forgesis nian lingvon. S-ro Jung kontraŭe pruvas, ke li ĝin posedas. La aŭtoro uzas multajn neologismojn, sed — laŭdinde — notas ilin k. donas klarigojn. Plej imitinda ago! Per tia ago oni ne misgvidas la leganton. Cetere vortoj kiel "starti, hangaro" estas plene akceptindaj. Ni bedaŭras, ke la aŭtoro ne notis ĉ i u j n novajn vortojn. Ni trovis ankoraŭ: incendio, ŝedo, atrapo, provianto, strangoli ktp. Ni bedaŭras la uzon de: tiukaze, ĉiukaze anst. tiuokaze, ĉiuokaze. Tiu "kazo" estas ofte misuzata precipe de germanoj. Kial "okazo" ne sufiĉu, se kaz' havas laŭ oficiala vortaro alian sencon? La vorto transversi en la senco de transiri estas erara. S. G. K.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

U j E l ö r e (Nova Antaŭen, hung.), Nov-Jorko, 21. 10. 27, Peko de pastro; 30. 10., Kiel vund. Iljiĉ; 6. 11., Boris Stefanov; 2. 12., Eston. malliberejoj; M u n k a s (laboristo, hung.), Ostrava-Brivoz, 21. 1. Kiel vund. Iljiĉ; 15. 2., Peko de pastro; 10. 2., Siberio post 10 j.; P a r i s i M u n k a s (hung.), Parizo, 4. 2., Siberio post 10 j.

Represis el "SR.":

U j E l ö r e, Nov-Jorko, 24. 10. 27, La blanka venĝo; 26. 10., Miĥaelĉjo; 6. 11., Tri festoj; M u n k a s, Ostrava-Pr., 10. 2., Vagonaro de morto.

Enhavis priesperantajn artikolojn kaj notojn:

S e m a j n a r a p o r t o de la Societo por kultur-interligo de Sovetio kun eksterl. (aperas kvarlingve), 21. 1., 2 art. k. resumon en esp.; D e r D e u t s c h e E i s e n b a h n e r (Germ. Fervojisto), Berlin, 19. 2. (kom. kurs.); F r e i e S p o r t - W o c h e, Leipzig, 27. 2. (ankaŭ en esp.); E l H e r a l d o O b r e r o, Meksiko, 11. 2.; R e v i s t a B l a n c a, Barcelona, 1. 3.; M u n k á s k u l t u r a, Budapest, marto, pri k. en esp-o; P l e b s, London, febr.; V o l k s b l a t t, Bochum, 23. 2., V o l k s z e i t u n g, Herne, 23. 2.; L e C h e m i n o t, Lausanne, 2. 3. (angulo).

Enhavis trad. el esp. art. k. leteroj:

T h e W o r k e r, London, 24. 2.; T h e L a b o u r W o m a n, London, marto (ankaŭ pri SAT); S ä c h s. A r b e i t e r - Z e i t u n g, Leipzig, 2. 3.; P s k o v s k i j N a b a t, 28. 7., 31. 7., 28. 9., 6. 10., 13. 10., 19. 10., 12. 11., 28. 12. 1927, 22. 2. 1928; P s k o v s k i j P a h a r, 22. 2. 1928; M o l o d a j a D e r e b n j a, 14. 10. 1927, 24. 2. 1928.

NIA POŜTO

10 438. — Kelkaj pĝ. de nia gazeto estus necesaj por bone respondi vian demandon. Mi nur diru, ke jam malaperis kelkaj civilizacioj: la babilona, la egipta, la roma k. a. Sekve, oni povas logike ankaŭ prezenti al si la malaperon de la nuntempa kapitalista civilizacio, kiu portas kun si tiom da ĝermoj de disfalo. E. L.

8294. — Ni laŭeble uzos vian rakonteton en "La Lern.".

10 389. — Aperos siavice.

7046. — Ni absolute ne scias, pri kiu artikolo vi parolas. Se plaĉas al vi resti en malliberejo, ni ne povas perforte liberigi vin.

3189. — Ni aperigas vian tradukon. La stilo estas bona; nur atentu pri uzado de l' difinita artikolo "la". Prefere verku originale pri lab. vivo.

9742. — "Ĥejtisto" aperos. Obstine daŭrigu viajn klopodojn.

6489. — Via stilo estas sufiĉe bona; vi certe povas akiri perfektecon, se vi tre atentas k. ne tro rapidas.

L. Iŝ. — Via artikoleto certe aperos. Varbu senlace inter viaj K-doj. R e d.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Sovetio.

K-do A l e k s a n d r o T i m i n s k i j, Arcibuŝevskaja str. 51, S a m a r a (V o l g o), dez. koresp. pri lab. movado k. a. temoj. Resp. garantiata.

K-do A. E. Z a b o j e v, poŝtkesto, 16, K o ĥ m a, IV.-Voznesensk. gub. dez. koresp. pri terkulturo, ĝardenkulturo, vilaĝana k. lab. vivo. Resp. garantiata.

— Grupo de lab. metalistoj dez. koresp. kĉl. laboristoj k. komunistoj pri soc. k. lab. temoj, certe resp. Adr.: K-do A. N e s t e r e n k o, Ekaterinovskaja 66, E j s k.

K-dino O l g a K r i v o p l a s, Kuznecnaja 12, K r j u k o v ap. D n e p r o, dez. koresp. pri div. temoj kun instruistoj, L, PK, PI, kĉl. Resp. garantiata.

K-do D. N i k o l a e v, str. de Tukaev 84, U f a, dez. koresp. pri proflaboro, fotografarto k. sporto kĉl. Nepre resp.

— Ni dez. koresp. pri klerigado, industrio, kooperativismo, virina movado, arto, muziko, lab. profesia k. partia vivo kĉl. Resp. garantiata. Adr.: E s p e r a n t i s t a r o n d e t o, str. Sovetska 14, ĉ. 6, U f a.

K-do S e l i ŝ ĉ e v S e m e n K s e n o f o n t o v i ĉ, vil. B r u s j a n i, Sosnovo-Soloneckoj volosti, Samar. gub., dez. koresp. kun kamparanoj k. laboristoj el ĉl. Resp. ĉiam garantiata.

K-dino A. S k r i p k i n a, str. Gogolevskaja 15 loĝ. 7, D n e p r o p e t r o v s k, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-dino M a r i o M a l k o v a, Borisovskij trakt. 47 kv. 2, M i n s k, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI.

— 15 junkomunistoj-tramistoj dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: I. B e s p a l o v, Krasnaja 65, K r a s n o d a r.

K-do K. A n u r i n, Krasnoarmejskaja 31, K r a s n o d a r, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

— Esperantista Komitato anoncas, ke K-do S. N. A p t e k m a n estas peranto por junulorganizoj, kom. jun. ĉeloj k. pionirorganizoj de urbo Rostov-Don. Adr.: R o s t o v - Don, Srednij pr. 39, kv. 6.

K-do P a ŭ l o R o ĥ i n (elektromuntisto), "Vodosovjet", G r o z n i j, Kaŭkazo, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj L, PK, PI, il. gaz.

ATENTU!

Rondeto de gejunuloj-esperantistoj, konsistanta el 30 personoj ĉe klubo 3. Internacionalo ĉe uzinoj de vagonaroj serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj pri junularmovado, kondiĉoj de vivo, laboro ktp. — Respondo ĉiam garantiata.

Adr.: USSR, (Sovetio), **gorod Beĵica,** Brjanskoj gub., Klubo de 3. Internacionalo, d. Krujka Esperantistov.

POR 1. MAJO

ni deziras aranĝi interŝanĝon de salutleteroj kun organizoj fervojistaj k. komjunularaj en ĉ. l. Respondo garantiata. Adr.: **USSR, Samara, Leo Tolstoj 94, ĵeleznodoroĵnij klub, al SEU-ĉelo.**

ENHAVO:

	pago
La kaŭzoj de milito	195—96
Göteborg, la urbo de l' 8-a SAT-kongreso	196
El Ĉilio	197
Ekleziaj aferoj en Estonio	197
Nia laborista klubo	197
Laboristoj, ni estas tro multnombraj	197—98
Tago el la vivo de alĝera "Fatma"	198
Faktoj sen komentoj	198
Ĝustigo	198
Efikoj de la pendigilo	198—99
Eksterordinara tago el mia vivo .	199
Tra Esperantio	200—02
Korespondado, anoncoj	202

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)